Sankta Meso, 7a dimanĉo de Pasko
20an de majo 2007a

Enira kanto: Adoru 359

Venu, Sankta Di-Spirit'.
Vi, Spirit' de l'ver'
Venu, Vi, ho Dia fort'.
Spirita fort' de Di'.
Venu, venu, venu.
Vi, Di-Spirit'

Kyrie-Alvoko: Adoru 038

Gloro-himno: Adoru 810.2

Resuma preĝo
Ĉiopova Dio, ni kredas, ke nia Savanto estas ĉe via dekstra flanko en sia gloro. Elaŭdu niajn preĝojn kaj faru, ke ni sentu lian ĉeeston inter ni ĝis la fino de la mondo, laŭ lia promeso. Per nia Sinjoro Jesuo Kristo, via Filo, kiu vivas kaj regas kun Vi en unueco kun la Sankta Spirito, Dio en ĉiuj jarcentoj.

Unua legaĵo - Ago 7, 55-60 (el La Agoj de la Apostoloj)
Etieno, plena de la Sankta Spirito, rigardis fikse al la ĉielo, kaj vidis la gloron de Dio, kaj Jesuon starantan dekstre de Dio, kaj diris: Jen mi vidas la ĉielon malfermitan kaj la Filon de homo starantan dekstre de Dio. Sed ili ekkriis per laŭta voĉo, kaj fermis siajn orelojn, kaj kuregis sur lin unuanime, kaj elpelis lin el la urbo, kaj ĵetis sur lin ŝtonojn; kaj la atestantoj demetis siajn vestojn apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo. Kaj ili ŝtonmortigis Stefanon, vokantan kaj dirantan: Jesuo, Sinjoro, akceptu mian spiriton. Kaj li genuiĝis, kaj kriis per laŭta voĉo: Sinjoro, ne metu sur ilin ĉi tiun pekon. Kaj tion dirinte, li endormiĝis.

Responsoria Psalmo (Psa 97)
Kantu al Dio novan kantikon,
kantu al Dio pri Lia glor' (Adoru 879.23)

La Sinjoro reĝas; ĝoju la tero;
Estu gajaj la multaj insuloj.
Nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ Li;
Vero kaj justeco estas la fundamento
de Lia trono.

La ĉielo rakontas Lian veron,
Kaj ĉiuj popoloj vidas Lian gloron.
Kliniĝu antaŭ Li ĉiuj dioj.
Ĉar la Sinjoro estas Plejalta super
la tuta tero.

Li gardas la animojn de Siaj fideluloj;
Li savos ilin de la mano de malvirtuloj.
Ĝoju, virtuloj, pro la Eternulo,
Kaj gloru Lian sanktan nomon.

Dua legaĵo - Apo 22, 12-20 (el la Apokalipso de sankta Johano)
Mi, Johano, aŭdis voĉon kiu diris: Jen mi rapide venos; kaj mia rekompenco estas kun mi, por repagi al ĉiu laŭ lia faro. Mi estas la Alfa kaj la Omega, la unua kaj la lasta, la komenco kaj la fino. Feliĉaj estas tiuj, kiuj lavas siajn robojn, por ke ili havu rajton sur la arbo de vivo, kaj ke ili eniru tra la pordegoj en la urbon. Ekstere estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la

Sankta Meso, 7a dimanĉo de Pasko
20an de majo 2007a

Enira kanto: Adoru 359

Venu, Sankta Di-Spirit'.
Vi, Spirit' de l'ver'
Venu, Vi, ho Dia fort'.
Spirita fort' de Di'.
Venu, venu, venu.
Vi, Di-Spirit'

Kyrie-Alvoko: Adoru 038

Gloro-himno: Adoru 810.2

Resuma preĝo
Ĉiopova Dio, ni kredas, ke nia Savanto estas ĉe via dekstra flanko en sia gloro. Elaŭdu niajn preĝojn kaj faru, ke ni sentu lian ĉeeston inter ni ĝis la fino de la mondo, laŭ lia promeso. Per nia Sinjoro Jesuo Kristo, via Filo, kiu vivas kaj regas kun Vi en unueco kun la Sankta Spirito, Dio en ĉiuj jarcentoj.

Unua legaĵo - Ago 7, 55-60 (el La Agoj de la Apostoloj)
Etieno, plena de la Sankta Spirito, rigardis fikse al la ĉielo, kaj vidis la gloron de Dio, kaj Jesuon starantan dekstre de Dio, kaj diris: Jen mi vidas la ĉielon malfermitan kaj la Filon de homo starantan dekstre de Dio. Sed ili ekkriis per laŭta voĉo, kaj fermis siajn orelojn, kaj kuregis sur lin unuanime, kaj elpelis lin el la urbo, kaj ĵetis sur lin ŝtonojn; kaj la atestantoj demetis siajn vestojn apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo. Kaj ili ŝtonmortigis Stefanon, vokantan kaj dirantan: Jesuo, Sinjoro, akceptu mian spiriton. Kaj li genuiĝis, kaj kriis per laŭta voĉo: Sinjoro, ne metu sur ilin ĉi tiun pekon. Kaj tion dirinte, li endormiĝis.

Responsoria Psalmo (Psa 97)
Kantu al Dio novan kantikon,
kantu al Dio pri Lia glor' (Adoru 879.23)

La Sinjoro reĝas; ĝoju la tero;
Estu gajaj la multaj insuloj.
Nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ Li;
Vero kaj justeco estas la fundamento
de Lia trono.

La ĉielo rakontas Lian veron,
Kaj ĉiuj popoloj vidas Lian gloron.
Kliniĝu antaŭ Li ĉiuj dioj.
Ĉar la Sinjoro estas Plejalta super
la tuta tero.

Li gardas la animojn de Siaj fideluloj;
Li savos ilin de la mano de malvirtuloj.
Ĝoju, virtuloj, pro la Eternulo,
Kaj gloru Lian sanktan nomon.

Dua legaĵo - Apo 22, 12-20 (el la Apokalipso de sankta Johano)
Mi, Johano, aŭdis voĉon kiu diris: Jen mi rapide venos; kaj mia rekompenco estas kun mi, por repagi al ĉiu laŭ lia faro. Mi estas la Alfa kaj la Omega, la unua kaj la lasta, la komenco kaj la fino. Feliĉaj estas tiuj, kiuj lavas siajn robojn, por ke ili havu rajton sur la arbo de vivo, kaj ke ili eniru tra la pordegoj en la urbon. Ekstere estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la

idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras mensogon. Mi, Jesuo, sendis mian anĝelon, por atesti al vi ĉi tion por la eklezioj. Mi estas la markoto kaj ido de David, la hela, la matena stelo. Kaj la Spirito kaj la fianĉino diras: Venu. Kaj la aŭdanto diru: Venu. Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo. Mi atestas al ĉiu, kiu aŭdas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro: Se iu aldonos al ili, Dio aldonos al li la plagojn, skribitajn en ĉi tiu libro; kaj se iu forprenos el la vortoj de la libro de ĉi tiu profetaĵo, skribitaj en ĉi tiu libro, Dio forprenos lian lotaĵon el la arbo de vivo kaj el la sankta urbo. La atestanto de tio diras: Vere, mi rapide venos. Amen; venu, Sinjoro Jesuo

Haleluja (3). Haleluja (3). (Adoru 037)
La Sinjoro ne lasas vin orfaj: li revenos al vi. Tiam via koro konos la ĝojon.
Haleluja (3).

Evangelio - Joh 17, 20-26 (el la Evangelio laŭ sankta Johano)
Kiam Jesuo transiris de ĉi tiu mondo al la Patro, suprenrigardante al la ĉielo, li tiel preĝis: Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektiĝu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis. Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas, ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili vidu mian gloron, kiun Vi donis al mi; ĉar Vi amis min antaŭ la fondo de la mondo. Ho Patro justa, la mondo Vin ne konis, tamen mi Vin konis; kaj ĉi tiuj scias, ke Vi min sendis; kaj al ili Vian nomon mi konigis kaj ankoraŭ konigos, por ke la amo, per kiu Vi amis min, estu en ili, kaj mi en ili.

Kredo-konfeso
Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova, la Kreinto de la ĉielo kaj de la tero; kaj je Jesuo Kristo, lia unusola Filo, nia Sinjoro, kiu estis koncipita de la Sankta Spirito, naskiĝis el Virgulino Maria, suferis sub Poncio Pilato kaj estis krucumita, mortis kaj estis entombigita; Li descendis al la infero, la trian tagon Li reviviĝis, ascendis en la ĉielon, eksidis ĉe la dekstro de Dio, la Patro ĉiopova, de kie Li revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Mi kredas je la Sankta Spirito, je la sankta katolika Eklezio, je la unueco de la sanktuloj, je la pardono de la pekoj, je la reviviĝo de la korpoj, je la eterna vivo. Amen.

Sankta-Himno (Adoru 810.4)

Patro nia (Adoru 039)

Ŝafido de Dio (Adoru 810.5)

Fina kanto (Adoru 029)
Restu kun la graco ĉe ni, Kristo Jesu'.
Kun via graco restu ĉe ni, Dio fidela.

idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras mensogon. Mi, Jesuo, sendis mian anĝelon, por atesti al vi ĉi tion por la eklezioj. Mi estas la markoto kaj ido de David, la hela, la matena stelo. Kaj la Spirito kaj la fianĉino diras: Venu. Kaj la aŭdanto diru: Venu. Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo. Mi atestas al ĉiu, kiu aŭdas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro: Se iu aldonos al ili, Dio aldonos al li la plagojn, skribitajn en ĉi tiu libro; kaj se iu forprenos el la vortoj de la libro de ĉi tiu profetaĵo, skribitaj en ĉi tiu libro, Dio forprenos lian lotaĵon el la arbo de vivo kaj el la sankta urbo. La atestanto de tio diras: Vere, mi rapide venos. Amen; venu, Sinjoro Jesuo

Haleluja (3). Haleluja (3). (Adoru 037)
La Sinjoro ne lasas vin orfaj: li revenos al vi. Tiam via koro konos la ĝojon.
Haleluja (3).

Evangelio - Joh 17, 20-26 (el la Evangelio laŭ sankta Johano)
Kiam Jesuo transiris de ĉi tiu mondo al la Patro, suprenrigardante al la ĉielo, li tiel preĝis: Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektiĝu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis. Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas, ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili vidu mian gloron, kiun Vi donis al mi; ĉar Vi amis min antaŭ la fondo de la mondo. Ho Patro justa, la mondo Vin ne konis, tamen mi Vin konis; kaj ĉi tiuj scias, ke Vi min sendis; kaj al ili Vian nomon mi konigis kaj ankoraŭ konigos, por ke la amo, per kiu Vi amis min, estu en ili, kaj mi en ili.

Kredo-konfeso
Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova, la Kreinto de la ĉielo kaj de la tero; kaj je Jesuo Kristo, lia unusola Filo, nia Sinjoro, kiu estis koncipita de la Sankta Spirito, naskiĝis el Virgulino Maria, suferis sub Poncio Pilato kaj estis krucumita, mortis kaj estis entombigita; Li descendis al la infero, la trian tagon Li reviviĝis, ascendis en la ĉielon, eksidis ĉe la dekstro de Dio, la Patro ĉiopova, de kie Li revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Mi kredas je la Sankta Spirito, je la sankta katolika Eklezio, je la unueco de la sanktuloj, je la pardono de la pekoj, je la reviviĝo de la korpoj, je la eterna vivo. Amen.

Sankta-Himno (Adoru 810.4)

Patro nia (Adoru 039)

Ŝafido de Dio (Adoru 810.5)

Fina kanto (Adoru 029)
Restu kun la graco ĉe ni, Kristo Jesu'.
Kun via graco restu ĉe ni, Dio fidela.